

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

56a jaro n° 6
novembro - decembro 1964

Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KLARADREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE
POUPEYE CHARLES

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :

DR. POL DENOËL
DURWAEL IVO ISERENTANT ROGER DE CUYPER GEORGES

ADMINISTRADO : TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO

DEBKUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

ĜENERALA PREZIDANTO

JAUMOTTE MAURICE

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORTRIJK
DRO DENOËL POL, 20 RUE V. RASKIN LIÈGE

UNUA VICPREZIDANTO

ROOSE FERNAND

VICPREZIDANTINO (AKESTRINO POR KONGRESOJ)

PLYSON J. 23, PLACO E. FLAGEY, BRUSĜLO 5 P.K. 236804

VICPREZIDANTO (AKESTRO PRI TEKNIKAJ RIMEDOJ)

VERSTRAETEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 107S HOBOKEN

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODOT, MONCEAU SUR SAMBRE


KASISTINO

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

POŝTKONTO DE B.E.F. : 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2
P.K. 9051.25



47-a Kongreso 4-a Markola Kongreso

Ni transprenis pezan heredajon de Lieĝo: la sukceso de la 46-a en la kastelo de Wégimont! Estos laŭ nia opinio tre malfacile por krei similan atmosferon kiel dum tiuj pentekostaj tagoj en la bieno. Certe ne eblas organizi nian Ostendan kongreson laŭ la sama metodo, do ni faris la inverson: ni larĝe malfermos nian arangon por ĉiuj Esperantistoj kaj por la eksterstarantoj; anstataŭ la intimeco de Wégimont, ni invados la banurbon, la Reĝino de nia marbordo.

Por povi tion fari, ni interkonsentis kun la organizantoj de la markolaj kongresoj okazigi la 4-an markolan kongreson en Ostendo, samtempe kun tiu de nia federacio. Gesamideanoj Hartridge jam vizitis nin de el Anglujo por preparoli la unuajn detalojn.

Cetere ni interkonsentis kun la skolttrupo de «Don Bosco» el kies anoj diversaj apartenas al la junulargrupo de Bruĝo, por aranĝi tendaron kaj ni do povas inviti la skoltojn de ĉi.

Antaŭ la eksterstarantoj, ni do kapablos prezenti nin multope, kaj ni petos ke ili vizitu nian ekspozicion por proprokule konstati kion Esperanto ebligas jam nun!

Ni invitas vin tutkore;

La Loka Kongresa Komitato :

Marmenout A.	Prezidanto
Hartridge L. (Markola kongreso)	Vicprezidanto
Poupeye Ch.	Vicprezidanto
Roose F.	Vicprezidanto
Snijkers Jos. (loĝiga servo)	Vicprezidanto
Maertens G.	Sekretario
Poupeye Yvonne	Kasistino
Couwenberg J.	Skoltoj
Dumarey A.	Festoj
Eneman J.	
Hynderycks C.	
Iserentant R.	Ekspozicio
S-ino Roose - Dekersgieter	
S-ino Verbeke S.	
F-ino Willems M.	

PROVIZORA PROGRAMO

Sabato 5.6.1965

15-a horo : malfermo de la kongresgicetoj.
Kongresejo, Festpalaco, Wapenplein, Ostendo.
Malfermo de la ekspozicio.

19-a horo : Oficiala malfermo, poste varia vespero kaj vizito al la fajroludoj de la skolta tendaro.

Dimanĉo 6.6.1965

10-a horo : kunsidoj de B.E.F. kaj de la Markolanoj.
Poste, akcepto en la urbodomo.
Komuna fotografado.

Posttagmeze, laŭ la vetero, ĉu la marbordo kaj boatekskursoj ĉu vizitoj al diversaj interesajoj.

19-a horo : Bankedo kaj poste balo.

Lundo 7.6.1965

Tuttaga ekskurso al la Bruĝa regiono kun Breughel-tagmanĝo en Bruĝo; vizito al granda fabriko.

Ciuj necesaj informoj estas indikitaj sur la aliĝilo; ni nur aldonas ke inter la hoteloj de la unua kategorio, troviĝas la Hotelo Metropole, kies posedanto estas nia vicprezidanto S-ro Snijkers Jos., kiu metas je nia dispono pli ol 60 litoj, je kvin minutoj de la kongresejo.

NUR POR MEMBROJ KIUJ REKTE PAGAS AL LA FEDERACIO

KATEGORIOJ		KOTIZO 1965 IZOLULOJ
Naciaj		
BM	Bonfaranta membro	200
M	Membro	125
FM	Familia membro	50
JM	Junula membro (16-25)	50
KM	Kadeta membro (ĝis 16)	25
	Kursanoj	50
	Abonoj	100
Internaciaj (U.E.A.)		
MJ	Membro kun jarlibro	135
MA	Membro-Abonanto	270
MS	Membro subtenanta	400
	Patr.	2.700
	Ab. + J — MA	200
	J — MJ	65

La grupkasist(in)oj bonvolu sendi la membroliston en TRI ekz. Dankon.

INTERNACIA ESPERANTO-KLUBO automobilista

Iniciatita dum la U.K. en Hago kaj nun jam starigita

La Komitato de UEA, dum la U.K. en Hago, komisiis tri el siaj membroj : S-rojn G. Grattapaglia, M. Jaumotte kaj T. Sekelj iniciati la starigon de Klubo por Aŭtomobilistoj-Esperantistoj.

Kvankam ne jam okazis ĝis nun grandskala propaganda agado, jam dekoj da membroj (**posedantoj** aŭ **regulaj uzantoj** de aŭtomobilo) anoncis sin, tiel ke, — ekde nun —, **la Klubo do estas starigita** :


La iniciatintoj, interkonsente kun la estraro de UEA kaj kun pluraj jam aliĝintaj membroj, decidis fiksi la kotizon por la jaro 1965 (kaj kiu inkluzivas la abonon al la revuo) je **UNU usona dolaro** aŭ 14 steloj aŭ **50 belgaj frankoj**, kiujn la jam aliĝintaj membroj kaj tiuj, kiuj deziras aliĝi post legado de tiu alvoko, povas sendi al la poŝtĉeknumero **N° 1700.10** de Maur. Jaumotte, De Bruynlaan 44 Wilrijk / Antverpeno (Belg.), kie estas adresotaj ankaŭ pagiloj (poŝtmandatoj, bankĉekoj aŭ internaciaj respondkuponoj, kiuj valoras 6 B. Fr.)

La insigno, kiu estos pretigita antaŭ la proksima Novjaro, kostos **0,40 cendojn** de usona dolaro aŭ 5,60 stelojn aŭ **20 B. Frankojn**. SED : aliĝpremie, la membroj, kiuj pagos sian kotizon antaŭ la **15a de decembro**, ricevos por tiu 20 BF. **DU INSIGNOJN**, kiujn ili do povos glui sur la antaŭan kaj malantaŭan vitrojn (aŭ la kofron).

Alvoko estas samtempe direktita al la teknikistoj, kiuj deziras helpi, ĉu al la kunmeto de la vortareto, ĉu al la redakto de la revuo.

Maurice G.D. JAUMOTTE
Estrarano de U.E.A.
De Bruynlaan 44
Wilrijk / Antverpeno (Belg.)

LA REDAKCIO PETAS
ENSENDOJN POR LA
JANUARA - FEBRUARA numero
PLEJ LASTE JE LA 21.12.1964



Titolpaĝo de la verkoj de W. Shakespeare, eldonitaj en 1623.

1564



william shakepeare

naskiĝis en la jaro 1564; preciza dato estas ne konata (li estis baptata la 26-an de aprilo) en Stratford-on-Avon ĉe la Henley Street. Tiu domo staras ĝis nun, kaj tie oni aranĝis muzeon: la "Shakespeare's Birthplace". (vidu la bildon supre.). Pro neplena kono de lia biografio ĝis hodiaŭa tago, ŝekspiroloj havas diversajn vidpunktojn pri lia vivo kaj verkaro. La angla dramaturgo forlasis sian naskiĝlokon en 1586. Li restadis dum la plej granda parto de sia vivo en Londono. Shakespeare estas tipa reprezentanto de la Angla renesanco: liaj verkoj estas kulminoj de okcidenta dramatiko. Nekompareble li povis priskribi la ĉefajn aktorojn de siaj teatraĵoj, ĉar li povis esprimi en klara teatra lingvo la profundajn animiturmentojn.

Dum la unua parto de sia verkista vivo, Shakespeare precipe skribis historiajn dramojn, dum ke pli poste li esprimis sian pesimismen en la gravaj tragedioj. La retrovitan mensan ekvilibron li dum la lasta parto de sia vivo esprimis en fabelludoj.

En 1610, la granda poeto forlasis Londonon por reiri al Stratford-on-Avon kaj morti tie en aprilo 1616; en sia kvindektria jaro li estis entombigita en sia naskiĝurbo.

Lige kun la solenaĵoj okaze de la 400-jara datreveno de la naskiĝo de Villamo Ŝekspiro, valoras mencii la kontribuon de D-ro L. L. Zamenhof en popularigo de la verkoj de la granda poeto el Stratford-on-Avon. Al la esperantista medio liajn verkaĵojn enkondukis Zamenhof mem. Jam en la jaro 1894 en Nurnbergo — apenaŭ do sep jarojn post apero de Esperanto — estis publikigita Hamleto, Reĝido de Danujo (Hamlet, Prince of Denmark). Dek unu jarojn poste jam aperis dua eldono de tiu ĉi dramo, kiu en la unuaj tri dekoj de nuna jarcento atingis en Parizo ses esperantajn represojn (!).

Komence de nia jarcento oni eldonis jenajn verkojn de la Stratforda poeto: La Ventego (Tempest), Londono 1904; Julio Cezaro (Julius Caesar), Londono 1906; Makbeto (Macbeth), Parizo 1908; Kiel plaĉas al vi (As You Like It), Vaŝingtono 1910.

Nuntempe la listo de la verkoj de Ŝekspiro tradukitaj en Esperanton enhavas jam 16 dramojn (kune kun novaj, troviĝantaj en presejoj).

BIBLIOGRAFIO

1. Verkoj de W. Shakespeare en Esperanto

Antonio kaj Kleopatro (Antony and Cleopatro) — trad. Stephen A. Andrew (proze); antaŭparolo de tradukinto. E-o Publishing Co., Rickmansworth, 1947, 95p.

Gajaj edzinoj de Windsor (Merry Wives of Windsor) — trad. Stephen A. Andrew (proze); antaŭparolo de tradukinto. E-o Publishing Co., Rickmansworth, 1948, 89 p.

Hamleto, reĝido de Danujo (Hamlet, Prince of Denmark) — trad. L. L. Zamenhof. W. Tümmel, Nürnberg, 1894. 136p. (en kvar kajeroj: Biblioteko de la Lingvo Internacia E-o, no. 71).

Julio Cezaro (Julius Cæsar) — trad. Daniel H. Lambert; antaŭparolo de tradukinto. Brit. E-o Association, London 1906. 85 p.

Kiel plaĉas al vi (As you like it) — trad. Ivy Kellerman. Sesa Int. Kongr. de E-o Vaŝingtono 1910. 137p. (ilustrita).

Makbeto (Macbeth) — trad. Daniel H. Lambert; antaŭparolo de tradukinto. Hachette kaj K-io, Paris 1908. 123p.

Otelo, la Maŭro de Venecio (Othello, the Moor of Venice) — trad. Reto Rossetti; antaŭparolo de Roy Walker. Stafeto 1960. 208p.

Reĝo Lear (King Lear) — trad. Arthur Curry kaj Archibald Ashley; antaŭparolo de tradukintoj. W. Limpert, Dresden 1924. 170 p.

Romeo kaj Julieto (Romeo and Juliet) — trad. Stephen A. Andrew (proze); antaŭparolo de tradukinto E-o Publishing Co., Rickmansworth 1945. 77 p.

Sonĝo de somermeza nokto (A midsummer night's dream) — trad. Louise Briggs; antaŭparolo kaj notoj de tradukinto. Brit. Lit. k Debata Soc., London 1921. 70p.

Trojlo kaj Kresida (Troilus and Cressida) — trad. Stephen A. Andrew (proze); antaŭparolo de tradukinto. E-o Publishing Co., Rickmansworth 1952. 94 p.

La Venecia komercisto (The merchant of Venice) — trad. Alfred E. Wackrill; antaŭparolo de tradukinto. Brit. E-o Association, London 1914. 101p.

La ventego (The tempest) — trad. Achille Motteau; antaŭparolo de tradukinto. The E-ist, London 1904. 96p.

El tragedioj de Shakespeare — kompilis Mijake Ŝihej. Japana Eo-Instituto, Tokio 1935. 100 p.

2. Verkoj nun preparataj

Hamleto, reĝido de Danujo (Hamlet, Prince of Denmark) — trad. L. L. Zamenhof. 8-a eld. notoj kaj antaŭparolo de D. B. Gregor. Editions Françaises d'Esperanto, Marmande 1964. 206p. 20 × 13 (plus antaŭparolo) (dek plenpaĝaj ilustraĵoj de McIntosh; 4-kolora kovrilo de Anny Goudin) ĵus aperis.

Hamleto, Princo de Danlando (Hamlet, Prince of Denmark) — trad. L. N. M. Newell. Stafeto.

Komedio de eraroj (Comedy of errors) — trad. William Auld kaj Asen Simeonov. Stafeto.

Mildigo de la megero (Taming of the Shrew) — trad. Gerald Jervis. Stafeto.

(El Monda Kulturo)

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj — Speguloj —
„securit” vitro
kolorigitaj vitroj
alumintaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitro-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20

KRUCVORTENIGMO No 11

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	L	I	P	E	R	T	E	M	P	O
2	O	K	O	N	E	T	I	A	R	
3	K	O	V	K	E	S	I	N		
4	O	N	I	O	O	F	I			
5	M	O	N	K	N	I	E	T		
6	O	E	P	D	A	T	O			
7	T	A	J	D	E	P	E	N	L	
8	I	D	O	N	O	Ĉ	I	O		
9	V	E	E	C	D	A	G			
10	O	P	E	R	A	C	I	I	T	O

DIFINOJ

HORIZONTALAJ :

- 1) ferio.
- 2) eĉ ne kvarone — kron'.
- 3) sid' sur ovoĵ — dependlga konkunkcio.
- 4) multaj aŭ kelkaj personoj — nederland-lingve « aŭ ».
- 5) Malgranda frenezet'
- 6) preciza tago.
- 7) Moment' kiam estas nek fluso nek malfluso.
- 8) posteulo — du alfabete sinsekvaj literoj — nenio mankante.
- 9) plenda ekkri' — kvalit' — far'.
- 10) paciento.

VERTIKALAJ :

- 1) kun ĝi vagonaro estas trajno.
- 2) sankta bildo — kun TO : ano de doktrino.
- 3) loko por inaj kornbestoj.
- 4) ne ekster — partet'.
- 5) dankpremia.
- 6) proedzlg.
- 7) malgrand' — ne rektlinie — supera estaj'.
- 8) maltaŭga promesita edz'.
- 9) duona paĉjo — malgrand' — kun H : senpera sinsekv' de vokaloj.
- 10) interesigas pri birdoj.

- N.B. 1) La apostrofo (') post difino, aŭ post iu vorto de la difino, montras ke nur la radiklo estas enskribota, do sen finaĵo.
- 2) La solvo aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos ellotata.
- 3) Sendu NEPRE vian solvon al : Ch. Poupeye, Elf Julistraat, 11, Bruĝo, dum la 10 unuaj tagoj post la apero.

SOLVO DE LA PROBLEMO No 10

Ensendis solvon : S-ino. De Hondt, Antverpeno ; F-ino De Coene, Ekeren ; S-ro. J.R. Van Eynde, Wilrijk ; S-ino. Ernst, S-ino. Plyson, F-ino. Opsomer, S-ro. De Neyer el Bruselo ; S-ro. Van Mullem et Blankenberge ; F-ino. Willems, S-ro. Iserentant el Bruĝo ; S-ro. Couwenberg el St-Kruis ; S-ro. P. De Smedt el Dendermonde. Bedaŭrinde ĉiuj estas eraraj. Ce H. 10, deziro ricevi honorinsignon, la taŭga vorto estas « ordenitemo » emo por esti ordenita (vidu ĉe vorto ordeno-ordeni en « Plena Vortaro », verko plej utila al krucvortemuloj kaj havebla ĉe Librejo « Sonorilo » (Senpaga reklamo !) Libro-premio estas do tiuĉfoje ne donacata.

M U E L I S T I N O
O B S E R V E M O N
N I - R E A L A - O
D - O N - T E G - M
L E K O - E F I K A
I T A L U J O - E T
N N - I R O N I - O
G A M B O - I N S P
V - O R - K - K - E
O R D E N I T E M O

ANTVERPENO ESPERANTO-GRUPO

« LA VERDA STELO »

Kunsidoj : Ciuvendrede en « Witte Leeuw » Frankrijklei, 4 je la 20,15a h. Poŝtĉeknumero : 726.54 Deurne.

La 21an de aŭgusto S-ro M. Jaumotte brile kaj detale raportadis pri la Universala Esp.-Kongreso en Hago.

La 28an 2 eksterlandanoj vizitis la grupon : Fino Emler el Gdynia en Polujo kaj S-ro Drajev el Bulgarujo. Ambaŭ raportis pri la vivo kaj la situacio de Esperanto en siaj landoj. Je ilia honoro S-ro Van Eynde prezentis la filmon (verkitan de Fino Enzlin) pri la U.E.K. en Sofio. Bulgara dancmuziko kaj popolkantado estis dum aŭdigataj por krei la ĝustan sferon. Dum la tago S-ro Van Eynde estis gvidinta la gastojn tra la urbo kiun ambaŭ plenkore admiris.

Dum la kunveno de la 4a de septembro S-ro C. Borremans rakontis pri sia vizito al Berlino, ambaŭflanke : okcidente kaj oriente. S-ro Vermuyten raportadis — en fantazia formo — pri sia loĝejo sur la maldekstra flanko de la Skeldobordo (la moderna, nuna nova urbokvartalo de Antverpeno) kaj emfazis en ĉio tio versaĵojn (de li tradukitajn) de Guido Gezelle. S-ro Verstraeten kompletigis la programon per persona travivaĵo en sia laborejo.

La 11an — por malfermi la vintran sezono — S-ro Maur. Jaumotte faris paroladon pri sia vojaĝo al kaj tra Jugoslavujo (kune kun edzino). Estis mirinda vojaĝo, riĉa je travivaĵoj kaj rimarkinda pro la tica sfero. Laŭ tre persona, tre ofte amuziga maniero, S-ro Jaumotte donis siajn impresojn pri ĉi tiu belega lando kies roka tero entenas preskaŭ neelĉerpeblan riĉecon je erĉoj, kie oni klopodas ĉie estigi novajn industriojn, kie la diferenco kaj kontrastoj inter oriento kaj okcidento klare elmontriĝas en la religio, la arĥitekturo, la vestaĵoj, la moroj kaj kutimoj. La tuta parolado estis ilustrita per granda amaso da lumbildoj. S-ro Verstraeten dankis la paroladiston dum la ĉeestantoj vigle aplaudis. Delagacio el Turnhout, Wijgmaal kaj

Lundon, la 14an en la lernejo de Belgiëlei, la elementa kurso komenciĝis kun granda sukceso. 19 Gelerantoj enskribiĝis. S-ro Jaumotte, kiel prezidanto, faris la enkondukon dum

GRUPA VIVADO

S-ro De Roover, kiel profesoro, gvidas la kurson.

La 18an S-ro M. Jaumotte prezentis sian « trimanotan revuon ». Fakte ĝi konsistas el bildfelietono (kiel aperas en la gazetoj) kies komentario li lerte tradukis kaj kaptis sur magnetofonan bendon. Temis pri 4 historioj : La Turo de Babelo, Cesar Franck, La Princlando Liechtenstein kaj la miriga Aventuro de Rudolf Hess. La Prez. tion speciale kreis por helpi al la plenumo de la programoj por aliaj grupoj. Li vekis pro tio viglan aplaudon.

La 25an Frato Hellebaut vizitis la grupon kaj kaptis la okazon paroladi pri la « Flegado de Mensmalsanuloj », — parolado kiu vere enkatenis la aŭskultantojn pro la nekutima temo. Poste S-ro De Roover rakontis pri sia « Unua malbona Poento en la Lernejo » kaj akiris en gaja sfero grandan aplaudon. Fino H. Hofkens amuzis la publikon per diversaj spritaĵoj kaj S-ino Bernaerts konkludis la programon per stranga historio kiu lasis al ŝi multajn demandajn signojn.

La 2an de oktobro S-ro Van Eynde prezentis dokumentajn filmojn inter kiuj « Lieĝo, la arda Civito » estis Esperante parolata.

La 9an dum la distra vespero S-ro Montmirail aŭdigis parton de radioelsendaĵo (de BRT-Antverpeno) al kiu partoprenis Marit Montmirail, Linda Verdijck kaj S-ro De Roover. La realigo de tiu-kaptado-sur-bendo estis verko de S-ro Wim Verdijck. Germana amiko, S-ro Bolle el Berlino, (en kompanio de S-ro P. Van Sitteren, Prez. de « La Naturamikoj » de Antverpeno) vizitis la grupon kaj salutis nome de la Berlina grupo. S-ro C. Borremans sukcesplene gvidis 20 minut-longan komunan kantadon de la ĉeestantoj. S-ro Verstraeten prezentis vortenigon kaj S-ro Van Eynde konkludis la distran programon per rakontado de la legendo de « Fonds de Ouareux » en la regiono de la Ninglinspo.

La 16an en restoracio « A la Coupe Glacée » 32 verdstelanoj ĝuis la manĝadon de grandaj, bongustaj, abundaj,

allogaj kaj dolĉaj mituloj kun terpomaj fritajoj ; agrablaj horoj kiuj tro rapide forpasis en amika kaj amuza sfero.

La 23an S-ro H. De Roover paroladis pri « La Hispana pentristo Goya » (anstaŭ la programo « Flandraj Arttrezoroj » de S-ro Schellekens, malhel-pata) kaj ilustrigis la paroladon per multaj lumbildoj. La aplaŭdo de la publiko montris la plenan intereson.

La 30an — lasta vendredo de oktobro — S-ro Vermuyten paroladis kaj montris belegajn diapozitivajn pri « Kristoforo Plantin kaj la Humanistoj ». La enhavo estis riĉa je historiaj sciindaĵoj kaj la lingva stilo, kiun la paroladisto uzis, senpeka kaj modela por la aŭdantaro kiu montris sian admiron per laŭta aplaŭdo.

FAMILIA VIVO :

Nekrologo :

Kun malgaja koro ni devas anonci la morton de S-ro J. Merckx post mallonga sufero. Al S-ino L. Merckx kaj familio ni prezentas nian tutan kunsenton en la profunda funebro kiu trafas ilin.

Al Ges-roj A. Van Dessel kaj parencoj ni esprimas nian sinceran respekton kaj kondolencan pro la morto de ilia kara patrino.

Ke ambaŭ gemortintoj ripozu en eterna paco.

Naskiĝo :

En la infanriĉa kaj Esperanta familio de Doktoro W. Peeters-De Keteleere naskiĝis unua, freŝa kaj bonfarta fileto « Bart ». Gratulojn ni sendas al la feliĉegaj gepatroj kaj familio. Bonfarton kaj tujan resaniĝon al la kuraĝa patrino.

HONORIGO :

Kun plezuro ni eksciis pri la honorigo de nia kasisto, S-ro R. Balleux, kiu ricevis la « oran medalon en la ordeno de la krono » pro sia 40-jara fidela deĵorado en la firmao Gulf Oil Company. Al nia kara amiko Balleux kaj lia afabla kaj fidela edzino, al liaj simpatiaj gefiloj ni esprimas niajn profundajn kaj sincerajn gratulojn.

DIAPOZITIVA, MAGNETOFONA kaj FILMA RUBRIKO :

Pro iniciato de S-ro M. Jaumotte li metas je la dispono de ĉiuj grupoj sonbendon kaj bildan programon de ± 1 horo pri diversaj temoj. La 4 historioj daŭras ± po 15 minutoj. Ĉiuj informoj ĉe J. Verstraeten, St Bernardsesteenweg, 1078 Hoboken.

« PACO KAJ JUSTECO » BRUGGE Sinte Klaradreef, 59, Brugge

En la grupo ni legis kaj priparolis la poemlibron de Porstein Fra Hamri. La ĝenerala juĝo estis pli severa ol la recenzo kiu aperis en « Sonorilo » : ne pocio ; ĉarlatanaĵo !

Okaze de la reelektado por la komunumaj konsilantaroj, nia specialisto, A. Dumarey donis paroladon pri la leĝoj tiurilataj.

S-ro G. De Brouwere el Kortrijk, prezidanto BEF por la Nederlandlingva sekcio, donis interesegan paroladon kun diapozitivaj pri Egiptujo. Li ĉiam speciale atentis la vivon de la popolo ; kaj tiel kreas la atmosferon per liaj komentarioj kiuj estas trafaj kaj atestas pri malfermitaj okuloj kaj oreloj. Tiu vespero okazis ĉe la prezidanto de la grupo.

La 4an de okt. parto de nia grupo, parto de nia junula sekcio kaj kelkaj membroj de la alia Bruĝa grupo iris aŭtobuse al Caudry en Norda Francujo por kunfesti la tagon de la Nordfrancaj samideanoj. Estis bela tago. Ni ĉiuj ricevis dufoje donacon, de la urbo kaj de la puntfabriko Molinier : tre belaj puntaĵoj.

La estraro decidis ke ni pli esploros la esperantan gazetaron por legi kaj priparoli en la grupo la interesajn artikolojn. Tion ni jam faris por artikoloj de Prof. G. Waringhien, de W. Auld, de S-ro Makkink. Ankaŭ ni komentarios la ĉefajn punktojn en « Esperanto » kaj aliaj publikaĵoj. Por la sportemuloj la vintra sezono jam rekomenciĝis en « Ter Groene Poorte » (= en la verda pordego) kie ni Volley-Ball-ludas. Komenciĝis ankaŭ la laboroj por la kongreso en Oostende dum Pentekosto proksiman jaron.

Nova kurso bone progresas.

BRUGA GRUPO ESPERANTISTA, Reĝa Societo. Poŝtĉekkonto N° 4835.33

Post libertempa periodo okazis kunvenoj la 25 an de aŭgusto kaj la 21 an de septembro por prepari la vintrajn laborojn.

Dum la kunveno de la 8a de septembro, S-ro J. Eneman interese paroladis pri angilkaptado.

La 15an de septembro komenciĝis nova elementa kurso, sub gvidado de S-ro J. Eneman ; bedaŭrinde la novenskribitoj estis nur malmultaj. Leciono de tiu kurso estis donata dum la unua

horo de ĉiu sekvanta kunveno. La dua horo de la 22a de septembro estis agra-
bligata per Leksikon-ludado.

Delegacio de la grupo ĉeestis diman-
ĉon 4an de oktobro la kongreson de
la Nord-Franca Esp. Federacio en
Caudry (apud Cambrai) kaj pasigis tie
tre agrablajn horojn, pri kiuj estis
detale raportata dum la kunveno de
la 6-a. La sekvantan mardon (13-an),
denove kartludado kaj la 20-an F-ino.
M. Willems detale raportis, kun elmon-
tro de multaj fotografiaĵoj kaj aliaj me-
morajoj, pri la U.K., kiun ŝi ĉeestis
komence de aŭgusto en Hago.

Lernigaj ludoj plenigis la kunvenojn
de la 27a de oktobro, 3a kaj 10a de
novembro.

Programo por estontaj kunvenoj

Ĉiumarde, je la 20-a, en « Strijders-
huis » Hallestraat, n° 14, Tel. N° 347.98;
dum la unua horo : leciono de la
elementa kurso, dum la dua horo :

DECEMBRO Ian : Parolado de Sro.
Ch. Poupeve pri « Padua, Verona kaj
Venezia » kun diapozitivoj.

8an : Sta. Nikolaofesto. Ĉiu alportu
nekonatan premion.

15an : Zamenhofa Festo. 22an : Kon-
kurso pri eraraj desegnaĵoj.

29an : Finjara vesperfestoj.

Familla Kroniko

KONDOLENCOJ al F-ino. M.L. Ver-
raes, membrino de B.G.E., pro la mor-
to de ŝia patrino : S-ino. VERRAES-
DILLIES (6/11/64).

REGA ESPERANTISTA GRUPO BRUSELA

Kunskudoj : ĉiulunde en « Monico Nord »
2, Brabanto strato Bruselo-3.

La 10an de Aŭgusto, niaj geklubanoj
grupe komentariis la diversajn oka-
zintajojn kaj neatenditajojn de la uni-
versala kongreso en Hago. Kelkaj ek-
sterlandanoj ĉeestis tiun kunvenon,
i.a. Sro Prof. Miguel Sancho Izquierdo,
el Zaragoza kaj gesinjoroj Ginz el
Israelo. Ili ankaŭ esprimis siajn per-
sonajn opiniojn pri la kongreso. Poste
Fraŭlino BEREGI Györgyi, el Buda-
peŝto prelegis pri interesa temo :
« Pri Lernejoj en Hungarujo ». La 17an,
unue Fraŭlino Jacobs legis protokolon
pri la junular-kongreso kiu okazis en
Broek-in-Waterland kaj juna hungara
studento, kiu ankaŭ partoprenis la
junular-kongreson pridiskutis la orga-
nizon, le flegadon k.t.p., Due Sro van
der Stempel David donis sian ĉiumo-
natan perfektigan kurson ; li ĉefe pri-
traktis la participojn. La 24an ni ĝuis
duoblan programon : la majstro-foto-

grafisto Sro Piron el Namur vidigis al
ni belegajn diapozitivojn pri vintraj
sportoj, kaj amator-magiisto Sro Sze-
gedy el Budapeŝto prezentis diversajn
amuzajn eĉ gajigajn magiaĵojn. La
Mehleno ĉeestis tiun belegan vesperon.
31an okazis parolado de Sro van der
Stempel pri « Aŭtoroj kaj Scenistoj ».

La 7an de Septembro, ni aŭskultis
la parolatan ĵurnalon. Sino Staes, Elly
akiris la plej multe da poentoj por la
temo : « Kulpa Junularo ». La 14an,
Sro van der Stempel daŭrigis la per-
fektigan kurson pri la « Participoj ».
La 21an, Sro Maertens. G. el Bruĝo
prezentis al ni mirindajn lumbildojn
kaj li tre detale rakontis pri la voja-
ĝo « Karavano al la Suno » (1963).
La paroladisto akiris grandan sukceson
pro la sprita kaj amuza prelego.

14an Zamenhofa Vespero. Parolos
Sro Albert Samyn.

21an Perfektiga kurso fare de Sro
van der Stempel.


28an Interesa Prelego.

ESPERANTISTA GRUPO VERVIERS

Dum junio lasta okazis ekzameno in-
ter la studentoj kiuj partoprenas la
kurson de Prof. Vanbreuse ĉe la Reĝa
Ateneo. Krom li mem, la ekzamen-
antoj estis Dro Denoël kaj Sinjoro
Dohogne, urbestro de Cornesse. La
ĉefa celo estis premii la du plej suk-
cesintajn lernantojn per senpaga par-
topreno je la T.E.J.O. Kongreso en
Amsterdam. Nia grupo kaj la Asocio
de la eks-studentoj de la Ateneo
(prezidata de Sro Advokato Masseaux)
bonvolis donaci la kostojn de la vo-
jaĝo kaj de la partopreno al po unu
junulo.

André HECK kaj Michel MATHIEU
estis la premiitoj kaj ĝuis ravan kon-
greson pri kiu ili raportis ĉe ni, kaj
franclingve, ĉe la Ateneo la 29an de
sept. dum speciala kunveno dediĉita
al iliaj kamaradoj kaj honorata de la
ĉeesto de Sro Mathieu, la prefekto,
de Fraŭlino Smets, Sroj Wilkin, Bon-
aventure kaj Jacob, profesoroj al kiuj
Prof. Vanbreuse instruis la lingvon.
Pluraj membroj de nia grupo ankaŭ
ĉeestis. Atrakcio estis la ĉeesto de
Sino Muller, germandevena sed edzi-
ĝinta en Verviers kiu ja ne konas la
francan lingvon.

Por la scio 1964-65, ĉe la Ateneo,
Prof. Vanbreuse gvidas tri kursojn
kaj Prof. Jacob du : po entute ĉirkaŭ
40 studentoj. Ekster tio, la grupo kun-
venos regule la Ian kan 3an mardon
de ĉiu monato ; kun varia tagordo.



ECENZOJ



HAMLETO, Reĝido de Danujo. Tragedio en kvin aktoj. Tradukis L. Zamenhof.
Ilustraĵoj de McIntosh. Oka eldono. Editions Françaises d'Espéranto, Mar-
mande, 1964. VIII 206 p., 13,5 20. Bindita.

Esperanto estis apenaŭ 7-jara, kiam en 1894 Zamenhof publikigis sian
tradukon de Hamleto, la fama dramo en kiu Shakespeare enscenigis la venĝon
de la Reĝido de Danujo kontraŭ la murdinto de lia patro.

Oni povus konsideri tro ambicia, tro aŭdaca la provon sufiĉe fidele trans-
poni la riĉan, nuancan lingvon de la angla majstroverko en Esperanton ankoraŭ
ne trapasintan sian infanaĝon kaj preskaŭ sentradician. Des pli ĉar Zamenhof
volis muldi sian tekston en versformon plej eble similan al la originalo. Sed
la flua, vigla kaj klara esperantigo pruvis lian majstrecon kiel ankaŭ la mirigan
flekseblecon de lia lingvo. La traduko, konstatas la Enciklopedio, « renkontis
senkomparan sukceson kaj pli efikis por la propagando de la lingvo, ol ĉiuj
plej lertaj admonoj ».

Certe, oni povas montri al makuletoj. Sed ĉu mirige, se al difinita nombro
da kernecaj, densaj versoj de la originalo respondas teksto iom pli longa, aŭ se,
por konservi la koncizecon, la traduko tie kaj tie forjoglas vorton kies
ellaso oni povus bedaŭri : (Ni pensas i.a. pri la anonco de Horacio, citanta la
krimojn kiuj konsistigas la dramon : « so shall you hear of carnal, bloody and
unnatural acts ». Kio reduktigas ĉe Zamenhof al : « Vi aŭdos faktojn sangajn,
nenaturajn », p. 205/449. Eltalis « carnal », kiujn faktojn Hamleto tamen
konsideras aparta abomenaĵo, foje kaj refoje riproĉante ilian adulton al siaj
onklo kaj patrino.)

— aŭ se pro la ritmo ĝi ŝanĝas trafan esprimon al alia malpli taŭga ; (Kiel pale
ja sonas p. 37/90 « Malbona io estas en Danujo » kompare kun la krude
frapa « Something is rotten in the state of Denmark ».)

— aŭ se por atingi la celitan versolongon, ĝi aldonas kion la senco ne bezonas ;
— aŭ se vortludoj, por kiuj Shakespeare tiel ardas, lamas aŭ eĉ perdiĝas en la
traduko : tiun tributon ĝi ja ne povas ne pagi.

Malpli facile klarigeblaj estas kelkaj aliĝoj, ekz. p. 76/465 « Per niaj virinoj
kaj fraŭlinoj » por « By'r lady » (Per Nia Sinjorino), unu el la oftaj popularaj
certigaj formuloj, pli fortaj ol nuraj ŝtopvortoj, kaj p. 129/237 « lacertoj » por
« adders fang'd » (vipuroj venendentaj). Ĉu kulpas misinterpreto, aŭ la fantazio
de la tradukinto, aŭ iu alia kialo ? Ne tro gravas, ĉar malgraŭ ĉi tio Hamleto
pruvigis elstara atingaĵo.

Ĝi plurfoje estis reeldonita en Parizo, ĉe « Librairie Hachette et Cie » kaj,
post la unua mondmilito, ĉe « Esperantista Centra Librejo ».

Kiom la Zamenhofa teksto difektigis jam en la dua eldono (kaj restis
same malbele makulita en la sekvantaj) pro preseraroj kaj la tiel nomitaj
korektoj de la franca editoro, pri tio informas G. Warrighien en sia eseo
« Kritika aparato de la Zamenhofa Hamleto » (Lingvo kaj Vivo, 1954, p. 263

k. skv.), kiun li finas per apenaŭ vualita invito : « Korektan kaj ĝuste komentitan eldonon de Hamleto mi ankoraŭ atendas ».

Kaj jen, kvazaŭ por ankaŭ en Esperantujo festi la 400-an datrevenon de la naskiĝo de la granda Viljamo, aperis la oka eldono sub la editorado de D. B. Gregor. Lia antaŭparolo instruas pri lia celo : plejeble respekti la Zamenhofan tradukon, forigante la preserarojn jam de jaroj inkrustigitajn kaj, post averto al la leganto, modifi formojn el lingva vidpunkto kritikindajn, kies varianton Zamenhof mem akceptis.

Ni tuj, kaj ŝate, konfesos, ke li plene sukcesis prezenti seneraran tekston : unika okazaĵo ĉe la esperantlingva eldonado. Unu rimarkigon oni tamen permesu : kial do sur la titolpaĝo ne estas menciita la nomo de la aŭtoro, de Shakespeare, kion la unua eldono (kaj cetere ankaŭ la aliaj) jes faris? Kaj kial ne gloso ĉe « Satiro », p. 17/160?

Se la esperantigo ne ĉiuloke estas sendevie fidela, la editoro, sekvante tiurilate la opinion de G. Waringhien (Escoj, 1956, p. 22) emas atribui almenaŭ parton de la neĝustaj al la nacilingva teksto kiun Zamenhof uzis. Ne, ne la anglan li uzis, sed iun germanan, aŭ polan, aŭ rusan, aŭ eble plurajn samtempe. Sed tiu enigmo provizore restas sensolva.

Tiu oka eldono tamen volas esti pli ol nur ekzakta repliko de la Zamenhofa teksto. Ĝiaj abundaj piednotoj fojon post fojo fidine resendadas al la originalo, kiam la traduko iom diferencas ĉu pro ellaso, ĉu pro aldono, ĉu pro iala aliigo. Tiel ĝi ebligas pli ĝustan komparon, pli justan taksadon de la respektivaj meritoj de aŭtoro kaj de tradukinto.

Sendube la studanto iom bedaŭros, ke la editoro ne pli konsekvence, pli komplete provizis sian Hamleton per tiuspecaj klarigoj. Sed ni ne estu tiel postulemaj, ni jam kontentigu per la multaj provesploroj, ĉar la laboro estas kompetente kaj zorge farita, la libro bele presita kaj plaĉe vestita. La Zamenhofa Hamleto tiel perdis sian cindrulinan aspekton : ĝi estu bonvena en Esperantujo.

D^r F. COUWENBERG.

REVUOJ kaj ARTIKOLOJ.

Ni atentigas niajn legantojn pri la jenaj vere intereseĝaj artikoloj kiujn oni devus en grupkunveno legi kaj priparoli.

Prof. G. Waringhien : festparolado okaze de la 56a Franca kongreso ; aperis en Franca Esperantisto Nr. 227 ; junio-julio 1964. Havebla : Rue de Chabrol 34 Paris (10). Temas pri unu kaŭzo de nia nesufiĉa progresado.

William Auld : « Mitoj kaj Faktoj Pri Esperanto » en The British Esperantist ; Noj julio-aŭg. kaj spt. 1964. Temas pri la kontraŭstaro je nia lingvo kaj la pseŭdosciencaj argumentoj kontraŭ ĝi. Havebla ĉe Holland Park Avenue 140 LONDON, W. 11.

G. F. Makkink : « Het Esp. in de tweede kamer » en « De Esperantist » sept. 64. Temas pri eduka kaj aliaj valoroj de esp. Havebla ĉe Hengelolaan 1027 en 's Gravenhage.

« RIPOZOJ » Bulv. Tolbuhin 51 Sofio Bulgarujo Num. 5 de 1964.

Artikoloj pri la Bulgara Chartreuse, Rodopi-montaro, Bulgara arkeologio kaj multaj aliaj. Tre belaj ilustraĵoj, multaj koloritaj. Anoncita artikolo pri la fama Rila-monaĥejo en venonta numero. Belega revuo !

« Norda Prismo » numeroj 1, 2, 3 de 1964. Barnhusgatan 8 Stockholm.

Tro riĉa enhavo por eĉ nur resumoj tie-ĉi. Estonte ni resumos ĉiun aperintan numeron aparte. Ni citas tamen : La junularproblemo en Danujo. Skopje la 27-7-63. Rakonto de Olja Erenburg. Muziko en Bildarto. Ch. Baudelaire : El la Spleno de Parizo. J. Korinek pri la titano Michel-Angelo. « Facila Vento » de A. Ĉehov. Virina rajto en Svedujo antaŭ 1900. Rapida karakterizo de F. Goya. Plie la regulaj kronikoj kaj recenzoj. Laŭ ebleco ni priparolos iun aŭ alian artikolon. La belega kaj bonega revuo meritas tion.

« Internacia Elparolo » nerompebla gramofondisko ; rapideco 33 1/3 r daŭro 15 minutoj. Prezo : 1,50 Nederl. Guld. aŭ 6 steloj. eldono de UEA.

La enkondukanto V. Sadler ne bone elparolas « ĉiu tiu » ; ĝi sonas ĉju tju. Milan Sudec de Aŭstralio elparolas la h kvazaŭ ĝi estus h.W. Schmid ne devis tiel infancigi sian voĉon por la parolparto de la principo. Estas la solaj rimarkoj. La tekstoj estas klaraj kaj agrablaj.

Raymond Schwartz : « Ne kiel Meier ». Broŝuro 48 paĝa. Eldonis Unuiĝo Franca por E-o. Rue de Chabrol 34, Parizo (10).

Se eble vi pensas, kara leganto, ke la batalo pri -ata -ita estas for, tiu-ĉi broŝuro jen venas por konvinki vin pri la malo. La titolo fontas el tio ke Dr. Zamenhof malpravigis L.E. Meier en lia gramatiko (Orig. Verkaro p. 490 let. Nr. 109 kaj « La Zamenhofa Esp. » p. 297 de la eldono Stateto.) Regulo 6 de la Fundamento, pri la verbo, donas nur du ekzemplojn de la pasiva formo : estas -ita ; kaj : estas -ata. Sed ekzistas ankaŭ la formoj estis -ita kaj estis -ata. Kion signifas tiuj du lastaj. Meier pensis ke la lasta povis esti nur pluskvamperfekto. Sed evidentigas el la fundamenta ekzercaro ke tio ne estas vera. Zamenhof uzis estis -ita ankaŭ en la senco kiun havas ĉe ni la formo estis -ata ; Ni konsideras tion mallogikaĵo. R. Schwartz klopodas, senesperige klopodas montri ke la -atismo estas mallogika kaj absurda. Li bezonas por tio multe tro da paĝoj por povi konvinki nin. Cetere T. Jung pli ol sufiĉe kaj evidente montris la oftan sensecon de la -itismo. Ĝi estas plie kontraŭ la signifo de la vortoj. Efektive, se oni skribas « estis », oni skribas pri pasinta tempo. Kaj se en tiu pasinta tempo oni uzas -ita, tio signifas ke la ago okazis jam antaŭe, estis jam for. Sed ni preferas ne daŭrigi tiun debaton. Fakto estas ke la fundamento montras ke ne ekzistas pluskvamperfekto en esperanto. Ni do sekvu ĝin... ĝis kiam ni staras antaŭ kazoj ne allaseblaj. Tie, pro klareco en la lingvo, kaj por eviti absurdaĵojn, kie estas do nepre necese, ni ŝanĝu estis -ita en estis -ata. Se vi volas unu ekzemplon, mi ĉerpas el « Heroldo » (16 nov. 1960 p. 3) la frazon : la krimulo estis persekutata kaj arestita. Sendube devas esti : kaj arestata. Vi legu ankaŭ la komenton. Feliĉe, la kazoj ne estas oftaj. Pliaj publikigaĵoj pri tiu temo venu nur se ili donas ion pozitivan. La pozitiva flanko de tiu - ĉi broŝuro estas la skizo « Kiel instrui la esperantan konjugacion ». Kion diri pri ĝi ? ke ĝi estas ĉiukaze pli malfacila ol sistemo kiu entenas la pluskvamperfekton. Por esti komplete informita, legu « Lingvo kaj Vivo » de Prof. G. Waringhien, paĝoj 194 ka. (eld. Stafeto).

Hans Andersen « La Novaj Vestoj de la Imperiestro - kaj du aliaj fabeloj » Eldono de KoKo en Kolby Kaas, Danujo. Prezo : 15 Dan. Kronoj aŭ 30 steloj.

Same belega eldono kiel « La Marvirineto ». Granda formato, 24 tutpaĝaj kolorilustraĵoj. La unua jam citita fabelo estas vera malgranda majstroverketo kiu mokas pri la vanteco kaj la snobismo de la homoj. La dua, « Hans-Fuŝulo » estas konata rakonto pri du svatantoj kiuj perdas, profite de tria, kiu ŝajne ne havis etan ŝancon antaŭe. Kaj la tria, « Estas tute certe » plezure montras la ĉiaman troigon de la homoj. Sendube, ĉiuj, infanoj kaj plenaĝuloj ŝatos posedi kaj legi la libron. Se ĝis nun mi havas nur laŭdon, mi devas tamen fari riproĉon en rilato al la lingvo. Tio mirigas min despli ĉar, laŭ la libro, ĝi trapasis rigoregan kontrolon. Oni ne diru ke teksistoj « komprenas » tekstoj : sed jes « kapablas » ; (p. 9) Dua alineo de sama paĝo : « Tio estus ja bonega vestoj » ; pli bone estus « tiaj... ». La fabelo « Hans-Fuŝulo » komencas per frazo kiu estas tro longa, por esti nur unu frazo. Kaj la dua frazo ne estas tre klara. Memoru ke la libro estas destinita unualoke al infanoj. Tiuj kelkaj etaj rimarkoj tamen neniam malhelpu por aĉeti la libron. Estas ja nur malgravaĵaj malperfektaĵoj.

VIVO KAJ OPINIOJ DE MAJSTRO M'SAUD, de Jean RIBILLARD.

Eldonis J. Regulo (Stafeto, Beletraj Kajeroj n-ro 18), La Laguna, 1963. 143 p., 19 x 12 ; kun portreto de la aŭtoro. Prezo : 5.70 gid.

En oazo de proksim-orienta dezerto la naiva azeneto M'Saud mirigite konatiĝas kun la muzulmana medio en kiu la hazardo permesis, ke ĝi naskiĝu. Ĉiuj aspektoj de la vivo katenas ĝian humore kritikeman atenton : la vivo ĉiutaga, festoj kaj festenoj, intertribaj kverecoj kaj militetoj. La doktaj instruoj

de ĝia filozofa onklo Musa, kiu malavare oferas al ĝi « la amarajn fruktojn de siaj spertoj », helpos nian azeneton lerte elŝeligi la kernon de la homa animo. Kaj certigu, ke ĝi plejofte ne estas edifa.

M'Saud plenfortiĝas, novan mastron pian ĝi pilgrimade portos al Mekko, tra elĉerpaj dezertoj. Siajn talentojn ĝi dediĉos al alispecaj profesioj sur la vojo returne : jen mulbredisto, jen dokisto en Porto Saido, jen, por fini sian karieron, turisma agenteo en Jerusalemo.

Sur tiu neniel eksterordinara kanvaso la aŭtoro plezure brodas artisme rakontitajn scenetojn, bonhumorajn anekdotojn, petolajn ŝercojn, subtilajn, iafoje piprecajn aludojn. Kelkfoje tamen lian mildan gajecon anstataŭas pikanta ironio, mordeta satiro, eĉ amara kritiko pri homa konduto ĝenerale, pri moroj, politiko, milito... Same kiel Musa, same kiel tiom da honestuloj, ankaŭ li ja havas ion por riproĉi : « Vi povas mezuri kiel la homoj malestimas lojalecon kaj honestecon en gravaj okazoj por alkonduki siajn aferojn al kontentiga fino. Cetere ŝajnas, ke ju pli potencaj ili estas, des pli malnoble ili spitas la naturajn leĝojn de la honoro, eĉ la simplajn principojn de la moralo. » (71). Envio kaj avido putrigas la politikon, li kun naŭzo konstatas, dum avido kaj natura emo al krueleco nepre al milito kondukas.

Por pitoreske vesti sian tekston, J.R. lerte fingras sur sia riĉa klavaro de elvokivaj vortoj. Zorgeme li fajlas kaj poluras en sia ebriga ĝojo alpingli la gustan vorton en la ĝusta loko, dum je ĉaj tie li enŝovas etosokrean esprimon (« matena figo por vespera soifo ») aŭ frapan komparon (« la nokto falis kiel hako »). Ni eble povus bedaŭri, ke J.R. ne povis finverki la memorarojn de Majstro M'Saud, ke li ne plu trovis okazon ankoraŭ retuŝi kelkajn okazajn troigajn bildigojn al kiuj lia pasia vortkulto lin unuamomente kuntrenis. (p. 121 : mi... sovaĝe forŝutis ŝanceliĝan podagrulon... ; .. homa bloko el kiu ŝprucis mia ĉifita nazo.)

Ĉiuokaze restas pli ol sufiĉe por frandi al leganto kiun neniu rapidemo impete pelas tra la paĝoj, sed kiu senhaste, plenĝue, sorbas lian bonhumoron kaj diskretajn aludojn, kaj pacience penetras en la precizan sencon de la vorto, ne kontentigante pri ia proksimumo.

R. Rossetti « redaktis » : pretigis la verketon por eldonado. Sentrudige : kiel la literaturan testamenton de J. Ribillard (1904-1962), eksmajoro de la franca afrika armeo. En tripaĝa Glosaro, R. Rossetti listigas la vortojn ne troviĝantajn en Plena Vortaro kaj Suplemento. Kaj samtempe atentigas pri la severa lingvodisciplino de la aŭtoro, kiu ne mem forĝas kiam alia ĝisdata vortaro jam disponigas. Eble legantoj bonvenigus ioman helpon ĉe kelkaj « propraj » nomoj, ne tiel facile troveblaj aŭ diveneblaj, kiel ekz. : Demoso (19), Ananka (25) (greke por : popolo, fato), Iŝa kaj Elohim (26) (hebree por : virino, Jehovo), Ali Boro uld Onagor (36) (laŭ la franca « Aliboron », azeno, kaj « onagre », sovaĝazeno).

Ĉe malrapida legado de miniaturo-preciza artisto ja ĉiu detalo valoras.
D' F. COUWENBERG.

INTERNACIA VINTRA FERIO


STELO invitas gejunulojn, kaj speciale gestudentojn, al la Internacia Vintra Ferio-Semajno, kiu okazos en :

ZAKOPANE (POLLANDO)

de la 26a de Decembro 1964 ĝis la 3a de Januaro 1965a.

Por skiamantoj oni aranĝos specialan ĉiutagan skisportan programon

F. SIMONNET 16, rue Dohis. VINCENNES (Seine) Francujo
Poŝtĉekkonto : 18.403-71 — PARIS.



47-a kongreso de B.E.F.

4-a markola kongreso

oostende

5-6-7/6/1965

pentekosto

ADRESO POR KORESPONDADO

Maertens G. Pr. Leopoldstraat, 51, Sint-Kruis (Belgujo).

ALIĜILO

Mi aliĝas al la kongreso kaj laŭ la suba specifo sendas la pagon kune kun la aliĝilo al **F-ino Y. Poupeye, 11 Julistraat, 11, Brugge (Belgujo)**; poŝtkonto n° 64 75 de la Banko Société Générale de Belgique en Brugge, por la n° 483986 / 2 de la kongreso.

FAMILIA NOMO : S-ro — S-ino — F-ino (nepre forstreku du)

ANTAŬNOMO :

STRATO KAJ NUMERO :

URBO KAJ EVENTUALE LANDO :

Nomo de la akompananta(j) familiano(j) :

KOTIZO

Gis 31.3.1965 : 100 F, poste 140 F
Por familianoj kaj gejunuloj malpli ol 25-jaraj : 75 F, post la 31.3.1965 : 105 F

LOGADO

1-a kategorio : unupersona ĉambro : 200 F
dupersona ĉambro : 350 F

2-a kategorio : unupersona ĉambro : 150 F
dupersona ĉambro : 250 F

Junulargastejo (nur 30 litoj !) : 60 F

Ĉiuj prezoj inkluzivas la matenmanĝon kaj valoras ponokte.

DIMANĈA BANKEDO : 150 F

LUNDA EKSURSO

(inkluzivas tagmanĝon) : 200 F

Donaco por la propagando (federacia kaso)

Entute

DATO SUBSKRIBO

manufakturaĵo ĉirkaŭ DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belĝujo) - Tel. (056) 216 54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2
	Abdijstr 57
	Anselmostr. 17
	Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9
	Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Voie 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2